



# TEA-BULTENO

5ª JARO — JANUARO-FEBRUARO 2002 — NUMEROJ 1-2

## Vortoj de la Redakcio

Kiel jam anoncite en la decembra numero de TEA-Bulteno, pro altaj kostoj de ekspedo estis decidite ĝin sendi al asocianoj ĉiun duan monaton. Tio kompreneble kaŭzas al ni ne malgrandajn problemojn, rilate al enlistigo de la mardaj kaj vendredaj klubaj (aŭ eksterklubaj) programoj. Ja estis ĉiam malfacile pretigi ion allogan, cele al VIA nombra partopreno en la organizitaj programeroj: kaj nun, kio estos? Eĉ tiuj fidelaj "kvar katoj" malaperos, ĉar ne plu estas ie, proprahejme, la kutima agendo de januaro, februaro, marto kaj tiel plu, sur kies paĝoj legi, ĉu io okazas en TEA ĉivespere?

Ni varme esperas, ke ne tiel estos! Ni fidas je vi! Memoru, ke ĉiam, ĉiun mardon kaj ĉiun vendredon, ni estas en la sidejo de VIA Asocio. Planojn por la jaro 2002 ni jam havas: nun ni bezonas VIN ĈIUJN por ilin realigi, konkretigi.

Do ni vidu, kio estas, ĝenerale, enprogramita en januaro kaj februaro:

**Ĉiumarde - Ni parolu Esperante!** Ekde la 20ª horo, paroliga, traduka, ekzerciga, progresiga kurso!

Dum la **vendredaj** vesperoj:

**04/01** - Estrarkunsido
**11/01** - Videofilmo pri la 70ª Itala Kongreso en Triesto
**18/01** - Novaĵoj el Esperanto-mondo
**25/01** - Kartluda vespero

> Ne forgesu, ke **dimanĉon la 20ªⁿ de januaro** okazos la Jara Asembleo de TEA: pro la gravaj temoj pritraktotaj, nepras via ĉeesto!

Kaj kio en februaro?

Programo ankoraŭ ne estas preta, tial vi estos akurate informitaj pri detaloj (ĉu ne pli bone, ke vi pli ofte vizitu la asocion kaj persone informiĝu?).

**Atentigo** - en la lasta februara semajno, t.e. de la 17ª ĝis la 24ª, okazos la **Semajno de Internacia Amikeco - Amikeco trans limoj**. La ideo festadi tra la tuta mondo la internacian amikecon, estis lanĉita en 1969 de la svedo Eric Carlén, kaj ekde tiam ĉi tiu bela tradicio daŭras kaj bele ripetiĝas ĉiujare kaj preskaŭ ĉiulande. En Triesto ni planas ion specialan, ion vere partoprenindan!

### Atentigoj

**Por asocianoj** kiuj havas elektronikan poŝtkeston: bonvolu sciigi al ni vian adreson, por esti rapide kontaktitaj kaze de programo-ŝanĝoj, aŭ/kaj por eventuale ricevi la bultenon interrete.

**Zorge** legu la anoncojn en la rubriko "Le ore della città" de IL PICCOLO: ni klopodos tie aperigi la vendredajn, enklubajn, programerojn.

## 2002 - Tikla jaro por nia Asocio

Karaj geamikoj,

bonvolu pardoni min pro la uzo de la vorto "tikla", sed efektive tia ĝi estos. Ni havas tiom da planoj por 2002, ke ... apenaŭ tiu ĉi bulteno sufiĉus por detale rakonti ilin. Kompreneble via necesa kaj grava helpo estas jam enprogramita, kvankam helpo kaj kunlaboro neniam estas troaj kaj pro tio, ekde nun, ĉia okazo por envolvi vin en la aferoj estos pli ol bona.

Sed ni pluiru rapide laŭ la kalendaro:

- januaro: ĝenerala jarkunveno, dum kiu vi povos elekti viajn reprezentantojn en la asocia estraro. Ne malĉeestu: la rendevuo estas tre grava kaj persona renkontiĝo kaj partopreno estas esenca por informiĝo kaj kunlaboro;
- februaro: Semajno de Internacia Amikeco. Ni planas publikan aranĝon kun partopreno de la Koruso IVAN GRBEC, de kroata aktora grupeto, de ni mem kaj poeziaĵoj kaj... eble eĉ pli, kursoj de esperanto...
- marto/aprilo: preparlaboroj por impona, priesperanta, filatela ekspozicio;
- majo/junio: filatela ekspozicio, ekskursoj en Karsto, Konferenco de Alp-Adrio en Rijeka, vizito de slovakaj gesamideanoj;
- aŭgusto: Eŭropunia Esperanto-Kongreso en Verono;
- septembro: preparlaboroj por "Barcolana";
- oktobro: partopreno en "Barcolana" per inform-budo, kursoj, AGOTAGO;
- novembro: kursoj, normalaj kaj specialaj;
- decembro: Zamenhofa Tago, Kristnaska kaj Novjara Festoj.

Krome, ni intencas organizi kurson por interpretistoj: kiu ŝatus partopreni? La preparo de tiom speciala kurso bezonas tempon, pro tio estus bone jam nun koni nombron de eventualaj partoprenontoj.

La kutimaj vendredaj vesperoj proponos al vi plurajn interesajn aferojn, inkluzive kartludon, kaj via ĉeesto estos aparte ŝatata. Ne pensu, ke, pro la supraj planoj, oni rezignos pri la kutima sideja agado!

Al ĉio ĉi, aldoniĝas la serĉado de nova sidejo. Tempo forflugas kaj alproksimiĝas la momento en kiu ni devos forlasi "via Crispi 43-1ª etaĝo": bonvolu helpi ankaŭ en tio. Ni bezonas taŭgan ejon, ne tro malgrandan, laŭeble en urbo-centro, teretaĝe aŭ maksimume unuaetaĝe, kaj krome ni bezonas MONON por ĝin aĉeti. Ja lui ion, pro la altaj kostoj, ne eblas kaj ne valoras, iasence ni estas devigataj aĉeti. Kiu bonvolos helpi? Anonciĝu, ni petas, eĉ sugestoj kaj rekomendoj estos bonvenaj.

Kun la espero renkonti vin okaze de la ĝenerala asembleo, ricevu plej korajn bondezirojn de fruktodona 2002ª jaro.

*Edvige Ackermann*

# Ordinara Jara Asembleo de TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de **TEA** okazos dimanĉe la **$20^{an}$ de januaro 2002 je la horo 9.30 en unua kunvoko kaj respektive je la $10^{a}$ en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

## TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2001.
   a) Morala raporto de la prezidanto *(E. Ackermann)*
   b) Agadraporto de la sekretario *(E. Doerfler)*
   c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto *(G.Valle)*
   ĉ) Deklaracio de la revizoroj *(A. Zerpini - E. Nocent)*
   d) Raporto de la triesta katedro *(E. Doerfler)*
   e) Raporto pri la libro-fako *(G. Valle)*
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

## DELEGILO

La asociano ____________________

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la $20^{an}$ de januaro 2002.

Subskribo ____________________

Dato ____________________

La kasisto, tre volonte, estos je via dispono por pago de TEA-, FEI aŭ/kaj UEA-kotizoj, abonoj al revuoj, ĵurnaloj ks, aliĝkotizo al la Itala Kongreso ktp ktp.



## Mesaĝas Renato Corsetti Prezidanto de UEA

### Agado Espero zaban-e-salam/lingvo de paco

La Esperanto-movado en pluraj manieroj bedaŭris pro la viktimoj de la atencoj en Usono dum la pasinta septembro. Same bedaŭrindaj estas la senkulpaj viktimoj de la milito en Afganujo. Ne estas multo, kion ni povas fari en ĉi tiu milito. La gloraj agoj de niaj antaŭuloj dum, ekzemple, la unua mond-milito ne estas nun ripeteblaj. Por tamen substreki la respekton por ĉiuj viktimoj, kaj ankaŭ por substreki la fakton, ke esperantistoj dum sia tuta historio ĝenerale ne akceptis militon kiel normalan manieron solvi intergentajn konfliktojn ("ne al glavo sangon soifanta" - diras tre konata linio de nia himno), la Azia Komisiono de UEA, kun la helpo de kelkaj neaziaj esperantistoj, decidis lanĉi kampanjon, per kiu ni rekte prenas la flankon de la nunaj viktimoj, la afganaj rifuĝintoj en najbaraj landoj.

Nur por doni ekzemplon de la situacio, mi diru, ke en Irano kaj Pakistano loĝas pli ol 4 milionoj da afganoj kiel rifuĝintoj. La plejmulto estas analfabetoj sed ekzistas inter ili instruistoj, inĝenieroj kaj kuracistoj, kiuj en sia lando havis bonan vivon sed pro la longa milito rifuĝis al Irano. Similaj estas la kondiĉoj en aliaj najbaraj landoj.

La kampanjo, kies nomo en la persa (vaste parolata en ĉiuj landoj de tiu mondo-parto) kaj en Esperanto estas "Zaban-e-Salam/Lingvo de Paco", konsistas el tri eroj:

1. kursoj de Esperanto por afganaj intelektuloj en la najbarlandaj rifuĝejoj;
2. kursoj por alfabetigi en la nacia lingvo afganajn analfabetajn rifuĝintojn;
3. materia helpo al la rifuĝintoj.

Al tiuj tri eroj laŭgrade aldoniĝos kvara ero, tio estas la starigo de ret-listo "dialogo inter civilizoj" por favori en pluraj lingvoj (inkluzive de Esperanto) dialogon inter azianoj kaj eksterazianoj.

La unuaj konkretaj agadoj komenciĝos en Irano pere de la helpo de iranaj esperantistoj kaj iranaj neesperantistaj asocioj, kiuj jam okupiĝas pri alfabetigo. Laŭgrade ili estos vastigataj al aliaj najbaraj landoj. La funkciigo de Esperanto-kurso por 20 rifuĝintoj kostas 100 usonajn dolarojn (por multobligo de disdonotaj materialoj, ktp.). Jam estas planataj du kursoj en Teherano kaj Maŝhado, kiuj komenciĝos en nuna monato.

Perkoresponda kurso de Esperanto por afganaj rifuĝintoj, anoncota pere de lokaj gazetoj, kostas po 15 usonaj dolaroj (materialoj kaj sendokostoj). Ankaŭ ĝi komenciĝos en januaro.

Alfabetigo de unu analfabeta afgana rifuĝinto kostas 15 usonajn dolarojn (materialoj kaj vojaĝado al la tendaroj de la rifuĝintoj). Ĉi tiu agado komenciĝos tuj, kiam venos la unuaj kontribuoj de esperantistoj, kiuj volas fariĝi subtenanto de unu afgana analfabeto, kiu lernu legi kaj skribi.

Materia helpo al la rifuĝinto estas libervola. La mono kolektota en la Esperanto-movado estos rekte, aŭ prefere en formo de materialoj bezonataj, transdonita al la rifuĝintoj.

Mi certas, ke pluraj el vi volos partopreni kaj instigi la esperantistojn de sia lando partopreni. La maniero por kontribui estas simpla: sendu vian monan subtenon al la konto AZIA FONDAĴO ĉe UEA, per la kutimaj pagmanieroj al UEA.

Vi rajtas indiki "lingvo de paco 1", "lingvo de paco 2" kaj "lingvo de paco 3" depende de la celo, kiun vi volas subteni. Se vi indikos nur "lingvo de paco" ni disdividos vian kontribuon inter la tri celoj.

Se vi volas rekte korespondi pri la kursoj de Esperanto kaj pri la alfabetigaj kursoj, bonvolu sendi mesaĝon al Reza TORABI <reza@esperanto.org>. Se vi volas rekte korespondi pri materiaj helpoj, bonvolu sendi mesaĝon al Hans BAKKER <hbakker@groenlinks.nl>.

Se vi volas korespondi ĝenerale pri la kampanjo kaj pri la maniero popularigi ĝin inter esperantistoj, bonvolu sendi ret-mesaĝon al Atilio ORELLANA <iei001@worldonline.nl>.

## Belartaj konkursoj de UEA en 2002

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 53ª fojo. La rezultojn oni anoncos en la 87ª Universala Kongreso de Esperanto en Fortalezo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj pri kategorioj:
**Poezio** - maksimuma longo ne fiksita;
**Prozo** - maksimuma longo: 200 x 65 tajpospacoj;
**Teatraĵo** - maksimuma longo ne fiksita;
**Eseo** - teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK - DIVERSECO: ŜANCO, NE MINACO;
**Kanto** - teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj;
**Videofilmo** - teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, daŭro inter 15 kaj 60 minutoj, sistemo VHS/PAL;
**Infanlibro de la jaro** - originala aŭ tradukita libro presforme aperinta en 2001.
Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri. Ĉiuj alvenu plej laste la 31an de marto 2002. Por videofilmo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1a de julio 2002.
La konkursaĵoj, krom videofilmoj kaj infanlibroj, estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas.
Konkursaĵoj estas atendataj ĉe:

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA
Nieuwe Binnneweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

## Novaj Oficistoj en Uea

UEA-estraro nomumis la Agantan Ĝeneralan Direktoron por la jaro 2002a. Temas pri **William Trevor Steele**.

Li naskiĝis la 14an de majo 1940 en Mareeba, Aŭstralio, kaj havas aŭstralian naciecon. Vaste konata kiel instruisto kaj sukcesa verkisto, li decidis akcepti la defion restarigi kunlaboran etoson en UEA kaj pli ĝenerale en la movado. Lia personeco kaj entuziasmo por la nova tasko estas sufiĉaj garantioj pri lia sukceso, pro kio la estraro formulas multajn bondezirojn kaj petas la esperantistojn, membrojn kaj nemembrojn, kunlabori kun li. Li ekoficos en Roterdamo la 1an de januaro 2002a.

La estraro nomumis redaktoro de la revuo ESPERANTO de UEA **Stano Marĉek** el Slovakujo. Stano, 48-jara, havas longan historion de redaktado de pluraj revuoj landaj kaj internaciaj. Li estas konata ankaŭ kiel aktivulo en pluraj kampoj de la movado (fondo de la junulara sekcio, instruado ktp.). Li ekredaktos la numeron 1an de la jarkolekto 2002a.

Ambaŭ nomumoj estas por la transira jaro 2002a, dum kiu la Oficeja Komisiono de UEA pluserĉos kandidatojn por pli longtempaj kontraktoj por ambaŭ postenoj. Kompreneble kaj Trevor kaj Stano estos inter la kandidatoj por tiuj kontraktoj.

Fermiĝas per tio la unua fazo de la laboro de la Oficeja Komisiono, kiu jam komencis okupiĝi pri aliaj bazaj problemoj: reorganizado de la komputila sistemo de UEA kaj helpo al malfermo de la "komunikad-centro" de EEU en Bruselo, dum daŭras konstanta provo reharmoniigi la funkciadon de la Asocio.

## Zeo-j

S-ro Raymond Boré daŭrigas la laboron de la forpasinta Hugo Röllinger kiel komisiito de UEA pri Zamenhof/Esperanto-objektoj (ZEO-j). Jam dum multaj jaroj li kunlaboris kun Röllinger pri la registrado de ZEO-j kaj interalie kolektis reprezentan fotoarkivon pri ili. De longe li estas ankaŭ fakdelegito pri tio. Nature la Estraro de UEA turnis sin ĝuste al li, kiam ĝi alfrontis la bezonon elekti posteulon de Röllinger.

S-ro Boré jam skizis sian laborplanon, pri kiu li skribis al UEA interalie: "La lasta ZEO registrita de Röllinger estis notita kiel n-ro 1260. Fine de oktobro la listo atingis n-ron 1283. Tiu laboro nepre necesigas helpon. Tial mi provos arigi plurajn ZEO-simpatiantojn, instigante ilin al fakdelegiteco pri ZEO-j en sia propra lando kaj mem listigi tiujn enlandajn. Por Pollando tio jam estas farita: Robert Kaminski listigis la polajn ZEO-jn, samkiel mi faris por Francio."

La adreso de la nova komisiito estas: Raymond Boré, 481 square Zamenhof, FR-73000 Chambéry, Francio; telefono/faksilo: +33 479 72 44 13.

## Radio-elsendoj



Ĉina Radio Internacia elsendadas esperantlingvajn programojn laŭ la sekva horaro:
**11:00h-11:27h** por Japanio, Koreio je 41,84m 7170 kHz kaj 41,96m 7150 kHz;
**13:00h-13:27h** por Sudorienta Azio je 25,75m 11650 kHz kaj 25,34m 11840 kHz;
**20:00h-20:27h** por Eŭropo je 41,29m 7265 kHz, 30,11m 9965 kHz kaj 42,19m 7110 kHz;
**22:30h-22:57h** por Latin-Ameriko je 30,43m 9860 kHz kaj 25,64m 11700 kHz.

La horoj estas laŭ universala tempokalkulo (UTC). La programo ĉiutage informas vin pri la plej freŝaj novaĵoj de Esperantio kaj de ĉina Esperanto-vivo. Krome estas interesaj programeroj, ekz. "Tra la mondo" (dimanĉe), "Esperanto en marŝo" (dimanĉe), "Ni parolu ĉine" (lunde, ĵaŭde), "Vojaĝo en Ĉinio" (marde), "Ĉina kulturo" (merkrede), "Ĉina manĝaĵo" (merkrede), "Hodiaŭa Ĉinio" (ĵaŭde), Muzika programero (dimanĉe), Literaturo (sabate).

Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia
16A Shijingshan Road, CN-100040 Beijing, Ĉinio
Rete: espradio@cri.com.cn

## Kunlaboro kun Irano

***Irana ĵurnalo serĉas novaĵojn en Esperanto***

La fama irana tagĵurnalo JAAM-E-JAM <http://www.jamejamdaily.com> pretas publikigi en sia "aventura kaj fremda" sekcio novaĵojn tradukitajn el Esperanto, pri "socialaj, homaj katastrofoj" okazintaj en eksterlandoj. Kiu deziras kunlabori, proponante Esperantajn novaĵfontojn (menciotajn sub la artikoloj) povas skribi Esperante al la ĵurnalisto Reza SAJADIAN
sajadian@dpimail.net

## Mallonge pri...

... Itala Esperantista Junularo invitas vin al sia tradicia jara renkontiĝo, **Internacia Junulara Festivalo**, kiu okazos de la 27ª de marto ĝis la 2ª de aprilo 2002 en Fenestrelle (Torino), nordokcidenta Italio.
Aliĝu ĉe http://www.esperanto.it/iej/ijf/2002/ aŭ ĉe ijf.admin@esperanto.it

La retpaĝo de **Biciklista E-ista Movado Internacia**, faka asocio de TEJO, troviĝas ĉe http://purl.org/net/bemi. Tie haveblas informoj pri ĝiaj venontaj biciklaj karavanoj. Nun, ekzemple, aperas informoj pri la "alta karavano" kiu okazos inter Francio kaj Italio, okaze de la venonta Internacia Junulara Festivalo en Italio. Krome vi trovos biciklan vortareton en ok lingvoj, inkluzive de Esperanto. Inf: Zav': XGodivier@esperanto.org

## Junuloj senpage en UK!

Ĉiuj, kiuj naskiĝis post 31.12.1981 ne pagas aliĝkotizon por la UK-2002 okazonta en Fortalezo, Brazilo! Tiun ĉi Universalan Kongreson antaŭvideble partoprenas granda kvanto da gejunuloj, ankaŭ pro tio ke okazas karavano al ĝi de la IJK en Pato Branko.

Molina Milanez - Rete: molinavm@uol.com.br

*el TEJO-Aktuale*

## Kuba kongreso


La 4ª Nacia Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio, okazas inter la 6ª kaj 9ª de marto 2002 en Havano, la ĉefurbo de Kubo. La partoprenantojn atendas diversaj seriozaj kaj amuzaj programeroj. Antaŭvidita alveno ankaŭ de eksterlandanoj. Okazos antaŭkongresaj kaj postkongresaj ekskursoj al belaj turismaj lokoj en Kubo.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:
Kuba Esperanto-Asocio
Pf. 51, CU-10500 Havano, Kubo
Rete: kubesp@ip.etecsa.cu

## Nov-Zelanda Esperanto-kongreso

Inter la 29ª de marto kaj 1ª de aprilo 2002 Nov-Zelanda Esperanto-Asocio en Wellington okazigas Nacian Esperanto-kongreson. Oni aranĝas diversajn amuzajn kaj seriozajn programojn. La ĉefa temo estas **instruado**.
Eblas renkonti kelkajn novbakitajn esperantistojn, kiuj partoprenas 5-tagan, Cseh-metodan Esperanto-kurson tuj antaŭ la kongreso.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio
Box 8140, Symands Street, Auckland, Nov-Zelando
Rete: esperanto-nz@geocities.com



## Brazilanoj ruze kaj lerte agadas!

### Esperanto en la stacidomo

La ĵus inaŭgurita aŭtobusa stacidomo de Rondonópolis, provinco Mato Grosso, Brazilo, prezentas informŝildojn en la internacia lingvo. La pasaĝeroj esperantistaj, kiuj alvenos, ekveturos aŭ trapasos la stacidomon, povos tre facile trovi la deziratan lokon pro tre videblaj esperantlingvaj ŝildoj. "Esperanto estas tre alloga temo, multaj homoj scivolemas kaj petas informojn pri la lingvo." diras s-ro Luiz Garcia, administranto de la stacidomo. La informejo nun disdonas faldfoliojn pri la internacia lingvo, kaj la publiko tre favore akceptas la proponon.

**La mesaĝo-kampanjo**: en junio 2001, dum la konstruado de la stacidomo, la urba Esperanto-klubo proponis al ties administrantoj, ke la ŝildoj havu ankaŭ esperantlingvan tekston, apud la portugala. La administrantoj montriĝis iom skeptikaj pri la uzebleco de Esperanto, kaj argumentis, ke ni devus pruvi, ke Esperanto estas vivanta kaj utila lingvo. Ili fiksis, ke se venos almenaŭ 200 retmesaĝoj el malsamaj mondpartoj, ili akceptos la proponon. La loka klubo do iniciatis kampanjon en interreto, por atingi la deziratan kvanton. Petoj estis dissendataj tra la esperantaj kaj priesperantaj retlistoj, kaj la esperanta popolo amase reagis al la kampanjo. Pli ol mil mesaĝoj alvenis, el pli ol sepdek landoj. Tia amasa reago forte impresis s-ron Francisco Luz, aŭtoron de la arkitektura projekto. "Estis vera surprizo ricevi tiom da mesaĝoj, el tiel diversaj mondpartoj", li diris. La ĉefadministranto, s-ro Luiz Garcia, kiu komence estis tre skeptika, estas nun unu el la plej entuziasmaj apogantoj. Al la loka gazetaro li deklaris: "La kampanjo montris, ke Esperanto estas vivanta, ekspansianta lingvo, kaj la ŝildoj helpos diskonigi nian urbon tra la lando kaj eĉ tra la mondo".

**La stacidomo**: ĝi nomiĝas "Alberto Luz", omaĝe al pioniro, kiu antaŭ kvindek jaroj enmigris la urbon kaj multe helpis en ĉi-ties socia kaj ekonomia disvolviĝo. Ĝi estas privata iniciataĵo, kaj servos al interurbaj kaj interprovincaj aŭtobusoj. Ĝia oficiala inaŭguro okazis je la 10ª de decembro 2001. La urbo Rondonópolis situas ĉe tre grava ŝosea kunfluejo kaj tra tiu stacidomo pasos ĉirkaŭ sep milionoj da pasaĝeroj jare.

**La urbo**: Rondonópolis situas en okcidenta Brazilo, apud ekologia turismejo Pantanalo, kaj mezvoje al Amazonio. Ĝi havas 180 mil loĝantojn, kaj estas la dua ekonomie plej grava urbo en la provinco Mato Grosso. La nomo Rondonópolis (= urbo de Rondon) omaĝas la marŝalon Candido Rondon, kiu komence de la 20ª jarcento starigis telegrafejon, ĉirkaŭ kiu naskiĝis la urbo.

**La loka Esperanto-klubo**: En la fruaj 1980ªj jaroj alvenis la urbon s-ro Ciro Gomes de Freitas, kaj fondis tie teatran grupon BRATEG. Tiu teatra grupo uzadis ĉefe Esperanton, kaj estis premiita de Belartaj Konkursoj en UK-1981 (Braziljo, Brazilo). En 1984 memlerninto Carlos Pereira kaj Ciro Gomes de Freitas okazigis diversajn kursojn, kiuj formis la duan generacion, al kiu apartenas klubestro Ilson Pereira dos Santos. Ĉiujare la klubano Pedro Battaglini instruas Esperanton al novaj generacioj.

*Informo elŝutita el http://www.kurso.com.br/stacidomo*

**Kvizo ?**

Kion signifas la vorto "kabei"?
1. Ekkredi araban religion
2. Praktiki japanan arton
3. Forlasi la Esperanto-movadon

*Solvo de la kvizo aperinta en la decembra numero: La lingvo en kiu estis skribita la libro "Zil vol lolik" estas IDO*

**Artikoloj fontas el RET-INFO, NOVA SENTO kaj NUN**


BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro-Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349